


LA PONTO

Tweemaandelijks tijdschrift van de Limburgse Esperantovereniging.



Jaargang 5, nummer 3 (27) september-oktober 2012

Verschijnt op de eerste dag van iedere onpare maand.

Erkenningsnummer: P808228

V.U.: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81, B-3940 Hechtel-Eksel

Tel. + fax 011-73.20.47 – E-mail: pieter-jan.doumen@telenet.be

LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)
Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.

Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato
Jarkolekto 5, n-ro 3 (27): septembro-oktobro 2012
Antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas ekde la 13-a.

Ĉiu rajtas plu sendi kaj disvastigi la revuon.

Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47

Retadreso: pieter-jan.doumen@telenet.be

Redaktore...

Karaj Gelegantoj,

La periodo de la ferioj denove estas pasinta. Mi esperas, ke vi ĝuis agrablajn tagojn de dolĉa neniofarado kaj malstreĉiĝo.

Nova laborjaro anoncas sin, ankaŭ por la Esperanto-movado. Ne forgesu renovigi vian membrecon ĉe via klubo, ĉe FEL kaj UEA, ĉar ankaŭ tiuj asocioj ne povas vivi sen via mona subteno kaj partopreno kun la celo antaŭenigi nian karan lingvon en la mondo.

En tiu ĉi numero vi denove trovos artikolon pri polemika temo. Mi ŝatas publikigi tekstojn kiujn oni ne povas legi en la 'normala' gazeta-ro. Ĉiuj novaĵoj estas kribrataj laŭ kriterioj kiujn difinas la 'potenculoj', tiel ke multaj aferoj ne atingas la grandan publikon. Tiel ili provas stiri la publikan opinion. La motivo de tiu konduto estas monprofito kaj potenco. Estas tamen grave, ke la publiko sciu, ke ekzistas aliaj versioj kaj opinioj. Laŭ konata franca devizo 'el la kolizio de la ideoj naskiĝas la vero' (du choc des idées, naît la vérité). Al tio mi volas alporti mian modestan 'ŝtoneton'.

Mi deziras al vi agrablan legadon !

Pieter Jan Doumen

Dua libro de l' Lingvo Internacia (8) (*Tweede boek van de Internationale taal*) (8)

b) Oni devas energie kolekti 'promesojn', ne timante la altecon de la nombro. Mi ripete tur-nas la okulojn de l' amikoj sur tiun ĉi punkton, ŝajne fantazian, sed efektive tre gravan. Ĉiu el la promesoj aparte havas signifon tre malgran-dan, kaj tial multaj ne volas kolekti, dirante, ke promesojn oni devas sendi en granda nombro aŭ tute ilin ne sendi. Mi ripetas, ke tia parolado estas tute malprava. Ne estimante apartajn

unuojn, ni neniam venos al grandaj nombroj. Ĉiu promeso aparte havas signifon la plej malgrandan ; sed unu post unu ilia nombro grandiĝos, kaj tiam ili prezentos grandegan forton kaj decidos per unu fojo la gravan demandon de lingvo internacia. Se miaj vortoj estas nesufiĉe kredigaj kaj vi restas skeptikaj, ne forgesu almenaŭ, ke malutilon la promesoj en ĉia okazo ne portas, se ili eĉ neniam venos al la esperata nombro, sed utilon ili ĉe feliĉaj rezultatoj povas alporti grandegan.



D-ro L.L. Zamenhof

c) Grandegan utilon alportos al la afero tiuj, kiuj riĉigos la literaturon de l' lingvo interna-cia. Nenio povas tiel bone imponi al la amaso, kiel faktoj kaj konstantaj signoj de vivo. Oni devas senĉese eldonadi ĉiam novajn verkojn pri la lingvo internacia, kaj la plej grava, 'en' tiu lingvo. La kampo tie ĉi estas granda : eldo-ni oni povas kaj devas multe. Antaŭ ĉio la ami-koj devas eldoni la gramatikon kaj la vortaron en ĉiuj lingvoj de la mondo. Eldonante la gra-matikon kaj la vortaron en la lingvo de iu popolo, vi donos al la tuta mondo la eblon korespondi libere kun ĉiu ano de tiu popolo.

La eldonado de la malgranda vortareto en ĉia aparta ligvo postulas malmulte da laboro kaj tre malmulte da mono. Oni devas eldoni ankaŭ vortarojn returnitajn; ĉar estas jam eldonitaj vortaroj rektaj, la pretigado de vor-taroj returnitaj estas laboro tre facila kaj mal-multe kosta. Laŭ la

mezuro de la progresado kaj riĉiĝado de l' lingvo oni devas eldonadi pli plenajn vortarojn, kaj estus bone, ke en ili la novaj vortoj, kreitaj de l' aŭtoroj mem, estus donitaj kune kun ilia franca traduko. Oni devas

Eldono de la Unua Libro

Antaŭ 125 jaroj aperis la Unua Libro de D-ro L.L. Zamenhof en la rusa lingvo sub la titolo : *D-ro Esperanto : Lingvo Internacia - Antaŭparolo kaj plena lernolibro por rusoj – Prezo : 15 kopekoj. VARSOVIO, 1887.*

Eĉ kun malgranda kapitalo eldoni libron en la Rusa Imperio ne estis facila afero. Zamenhof devis trovi presiston, kiu pretis presi libron parte en nekonata lingvo.

La rusa cenzuro estis tre severa. Komprenoble neniu cenzuristo en Rusio kapablis legi la novan lingvon, escepte de la patro de Ludoviko, Marko Zamenhof, kiu estis cenzuristo por libroj nur hebreaj kaj jidaj. Zamenhof decidis presigi la libron unue en la rusa, ĉar oni donis pli facile permeson por rusaj libroj. Sekvanta libro en alia lingvo ricevos permeson pli probable, se ruslingva eldono jam aperis. La carista registaro favoris la presadon de rusaj libroj en la polaj gubernioj. Sed ekde la mortigo de caro Aleksandro II-a en 1868 la cenzuro iĝis multe pli severa. Marko Zamenhof finfine solvis la problemon : li sukcesis persvadi sian amikon A. Lagodovskij, la tiaman cenzuriston por rusaj libroj en Varsovio, permesi la libreton kiel nur sendanĝeran etan kuriozaĵon. La cenzuro estis duobla : unue la cenzuristo devis legi la manuskripton kaj permesi la presadon, kaj poste li devis tralegi la presprovaĵon kaj permesi la disvendadon ! Komprenoble tia sistemo malfruigis la aperon de libroj kaj ĝenis la verkistojn. La presprovaĵoj de la unua libro de D-ro Zamenhof kuŝadis dum du monatoj ĉe la cenzuristo. Sed danke al la helpo de Lagodovskij la permeso presi la libron venis je la 2-a de junio 1887. En la libro mem troviĝas la dato "21-a de majo" (laŭ la julia kalendaro ankoraŭ en uzo en Rusio, kiu malfruis 11 tagojn kompare al la gregoria), kaj la permeso disvendi ĝin venis la 26-an de julio.

Iom antaŭ la apero de la libro Ludoviko kaj Klara Zilbernick gefianĉiĝis. Klara kaj ŝia patro Aleksandro estis pretaj elspezi grandan parton de la doto de Klara por eldoni la unuan libron pri la nova lingvo, kaj disponigi al Ludoviko tiun ĉi kapitalon jam antaŭ la geedziĝo.

La gaja vervo de Klara helpis la modestan edzon al pli granda memfido. Ŝi estis preta dediĉi sin tute al lia idealo, eĉ fari por li multan

sekretarian laboron. Ŝi komencis sian longan karieron de sindediĉo, pakante por dissendado la ekzemplerojn de la libro.

(Laŭ "Zamenhof" de Marjorie Boulton)

*Met de hartelijke groeten van
Kun la koraj salutoj de*

KBC-Bank Hechtel

Rode Kruisplein 5

B-3940 Hechtel

Tel. 011-73.02.20

Fax 011-73.02.21

hechtel@kbc.be

eldoni pli vastajn lernolibrojn, laŭ bone meto-doj, kun multaj ekzemploj kaj pecoj por tradu-ki, ĉar la lernolibro, kiujn mi eldonis mem, estas tre malgrandaj, kunpremitaj kaj faritaj nur por homoj pli-mapli instruitaj. Fine, por ke la lingvo eble plej rapide fortiĝu kaj riĉiĝu, oni devas eldoni kiel eble plej multe da verkoj en la lingvo internacia, originalaj aŭ tradukitaj ; kaj tiuj personoj aŭ rondetoj, kiuj havas la eblon, devas komenci eldonadi gazetojn kaj ĵurnalojn en la lingvo internacia.

El ĉiuj specoj de verkoj, pri kiuj mi parolas, mi mem povas eldoni nur tre malgrandan parton, ĉar mi havas tro malmulte da tempo kaj tro malgrandajn kapitalojn. Ĉiu el la amikoj de l' lingvo aparte povas ankaŭ eldoni nur malmul-te. Sed se ĉiu el ni faros tiun malmulton, kiun li povas, tiam la literaturo de l' lingvo internacia rapide vastiĝos.

Por ke ĉiuj povu scii pri ĉiu nova eldonita verko, mi petas ĉiun, kiu eldonos ion pri la lingvo internacia aŭ en tiu ĉi lingvo, sendi al mi unu ekzempleron de sia verko; ĉar komen-cante de Aŭgusto 1888 mi eldonados ĉiuno-nate nomarojn de ĉiuj verkoj pri la lingvo internacia, kiuj eliris de la komenco ĝis tiu ĉi tempo. Apud ĉiu verko estos dirite, kiu ĝin eldonis, kiom ĝi kostas kaj kie oni ĝin povas ricevi. Alsendinte la koston de poŝta trans-sendo, ĉiu povas en ĉiu tempo ricevi de mi la plej novan nomaron de l' verkoj. La eldonan-tojn de l' verkoj mi petas ankaŭ, ke en la fino de ĉia verko aŭ verketo, kiun ili eldonos, ili presu ĉiam la plej novan el la diritaj nomaroj. Mi esperas, ke neniu el la

eldonantoj malkon-sentos plenumi mian peton, kiu estas egale grava por la eldonantoj kiel por la afero mem.

ĉ) Tre grava por la progresado de la l' lingvo internacia estas ĝia diligenta uzado en korespondado kun amikoj kaj konatoj aŭ eĉ kun nekonatoj. Kiom ajn vi ripetados al la amaso pri la utileco kaj la oportuneco de l' lingvo, la plej granda parto de l' amaso restos surda por viaj vortoj, ĉar ĝi timos, ke vi postulas de ĝi ian oferon. Sed se ĉiuj amikoj de l' lingvo internacia anstataŭ paroli 'farados', tiam vi baldaŭ vidos, ke la tuta indiferenta amaso aliĝis jam al la afero, sen bruo kaj eĉ mem tion ne vidinte. Ricevinte de vi leteron internacian kaj kompreninte ĝin, kvankam li la lingvon ne lernis, via adresito vidos 'praktike' la oportu-necon de l' lingvo, kaj li komencos mem ĝin uzadi ; se li restos indiferenta, ricevinte kelkajn fojojn tiajn leterojn, li jam scios sufiĉe bone la lingvon, tute ĝin ne lerninte.

d) Estas kompreneble ankoraŭ multaj vojoj kaj vojetoj por progresigi l' aferon de l' lingvo internacia, sed mi devas ilin lasi al la bontrovo kaj plaĉo de ĉiu aparta persono. Estus bone, se en ĉiuj urboj kaj urbetoj estus kreitaj rondetoj por kune labori por la afero de l' lingvo (en kelkaj urboj tiaj rondetoj jam estas kreitaj). Per pripensado kaj laborado kunligita oni ĉiam povas pli multe fari, ol laborante aparte. Sed unu aferon oni ne devas forgesi : ni devas esti atendemaj kaj konstantaj; ni ne devas atendi, ke aliaj nin kuraĝigu per sia ekzemplo, kaj ni ne devas perdi la kuraĝon kaj malvarmiĝi, se ni tiun ekzemplon ne vidas, - ni devas per nia propra laboro doni ekzemplon al aliaj ; kaj se en la unua tempo neniu al ni aliĝos, aŭ se oni eĉ ridos je ni, ni devas kredi, ke pli aŭ malpli frue la ridantaj venos al ni. Ni iru kuraĝe antaŭen, ĉar nia afero estas honesta kaj utila !

Tiu ĉi libreto estas la lasta vorto, kiun mi elparolas en la rolo de aŭtoro. De tiu ĉi tago la estonteco de l' lingvo internacia jam ne estas pli multe en miaj manoj, ol en la manoj de ĉia alia amiko de la sankta ideo. Ni devas nun ĉiuj egale labori, ĉiu laŭ siaj fortoj. Ĉiu el vi povas nun fari por nia afero same tiom kiom mi, kaj multaj el vi povas fari multe pli ol mi, ĉar mi estas sen kapitaloj, kaj el mia tempo, okupita de laboro por la ĉiutaga pano, mi povas oferi al la amata afero nur tre malgrandan parton. Mi faris por la afero ĉion, kion mi povis, kaj se ĉiu efektiva amiko de l' lingvo internacia alportos al ĝi eĉ la centon parton de l' moralaj kaj mate-rialaj oferoj, kiujn mi al ĝi alportis tra dekdu jaroj ĝis hodiaŭ, tiam

la afero iros bonege kaj venos al la celo post la plej mallonga tempo. Ni laboru kaj esperu !
(fino)

(D-ro L.L. Zamenhof)



Novajoj el Esperantolando

(Nieuws uit Esperantoland)

Belgio : EU rifuzas himnon en Esperanto –


La Eŭropa Komisiono oficiale rifuzis la proponon de la Eŭropa Esperanto-Unio pri popoliniato rilate kantadon de la eŭropa himno en Esperanto. Laŭ la motivigo de la Eŭropa Komisiono la propono kolekti sub-skribojn subtene al himno en Esperanto ne estas akceptebla, ĉar neniu EU-lando agnoskas Esperanton kiel parton de sia kultura heredaĵo "La Komisiono malakceptis eĉ la eblon komenci kolekti milionon da subskriboj nece-san por tiu iniciato," skribas Zlatko Tišljár, la sekretario de EEU en sia retletero dissendita la 1-an de junio. Li atentigas, ke ekzistas mult-taj lingvoj en Eŭropo, kiuj sendube kontribuas al la eŭropa kultura heredaĵo, sendepende de tio, ĉu ili estas oficiale agnoskitaj. Ni menciuj la romaan, rusan, kurdan, turkan, araban, ĉinan kaj multajn aliajn lingvojn en kiuj kulture kreas milionoj da eŭropaj civitanoj.

Al tiuj sendube apartenas ankaŭ Esperanto, kiu apartenas al la 30 lingvoj kun la plej riĉa vikipedia materialo en la mondo, al la 64 lingvoj de la Google-tradukiloj kaj kiu havas riĉan originalan kaj tradukitan literaturon kun pli ol 100.000 libroj.

Zlatko Tišljár supozas, ke la Eŭropa Komisiono timas sukcesan nomkolektan kampanjon, kiu laŭ li povus "startigi tuteŭropan debaton pri la demando de efika kaj justa komunikado en la Eŭropa Unio".

La estraro de EEU opinias skandala la decidon de la Komisiono malpermesi la apli-kon de la nova leĝo pri popolinciato al EEU.

(Ret-Info, Eventoj, Hungario)



Argentino : *UK en Bonaero en 2014 –*

La 99-a Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 2014-a okazos en la urbo Bonaero en Argentino. La estraro de UEA elektis la ĉef-urbon el inter tri argentinaj urboj, kun kies organizaj kondiĉoj la kongresa respondeculo de UEA Clay Magelhães antaŭe konatiĝis surloke.

Argentino gastigos la UK-on por la unua fojo, sed Esperanto havas tie jam longan tradician. La lingvo estis enkondukita en la landon en 1889 fare de la pola rifuĝinto Polasky. La landa asocio de UEA, la Argentina Esperanto-Ligo, estis fondita en 1914. Ĉar unu el ĝiaj kunfondintoj estis Tibor Sekelj, estas bela koincido, ke la elekto de Argentino okazis ĝuste en la jubilea jaro de la 100-a datreveno de lia naskiĝo. (Ret-Info, Eventoj, Hungario)

Brazilo : *Interesaj filmetoj pri E-aranĝo –*

Fábio Monteiro estas profesia brazila ĵurnalista, kiu antaŭnelonge iĝis esperantisto. En internaciaj Esperantaj rondoj li konatiĝis per lia unua jutuba videofilmeto *Karnavala Festo en Esperanto*.

Fábio nun lanĉis propran blogon, kie li anoncas la projekton Globeto, iuspeca interreta televido, per kiu li intencas publikigi siajn Esperantajn filmetojn. Tie jam troveblas okulfrapa bona filmeto pri la pasintjara Tutamerika Kongreso de Esperanto, TAKE, okazinta en Sao Paulo, Brazilo. Fábio sprite kaj trafe prezentas la ĉefajn erojn de la Kongreso.

La filmo, kiu havas du partojn, taŭgas por mem rigardi kaj ĝui ĝin, kaj por prezenti ĝin al

lingvolernantoj kaj kursanoj por virtuale sperti la etoson de la Esperantaj aranĝoj.

(Ret-Info, Eventoj, Hungario)

Nederlando: *Diplomoj pro fidela membreco -*

Ĉi-jare 18 esperantistoj ricevis diplomon pro sia 50-jara seninterrompa membreco en la Universala Esperanto-Asocio. Krome 22 aliaj ricevos diplomon kiel ateston, ke ili estas individuaj membroj de UEA de 40 jaroj. Tiun honorigon pro fidela membreco iniciatis estraranino Loes Demmendaal, kaj la unuaj diplomoj estis disdonitaj en la jaro 2009. La diplomoj estas subskribitaj de la prezidanto de la UEA prof. Probal Dasgupta.

Inkluzive de la ĉi-jaraj ricevontoj, ĝis nun 218 esperantistoj ricevis diplomon pro 50-jara kaj 264 pro 40-jara membreco en UEA.

(Ret-Info, Eventoj, Hungario)

Japanio: *Nova libro pri Hiroŝimo –*

La Hiroŝima Esperanto-Societo eldonis belan 56-paĝan libreton en la formato 15x21 cm pri Hiroŝimo sub la titolo *Pli sciu pri Hiroŝimo*. Ĝi estas ilustrita per multaj fotoj. La kovrilo kaj la prezento de la libro estas videblaj ĉe <http://www.ipernity.com/doc/32119/12975027>.

Alia menciinda libro estas la biografio *Flamigian korpon* de la bedaŭrata sam-ideano Jui Ĉunoŝin, kiu bruligis sin proteste kontraŭ la por-usona politiko de la tiama ĉef-ministro Satō Eisaku en 1967. La aŭtoro Higa Koobun esploris lian vivon kun helpo de esperantistoj kaj verkis 400-paĝan libron, kiu enhas ankaŭ detalan priskribon pri malmulte konata flanko de la historio de nia movado en Japanio (KLEG : Japanaj eldonaĵoj en 2011.)

Jui Ĉunoŝin estis japana esperantisto. Li tradukis el la japana en Esperanton la libron *Viktimoj de la atombombo – travivaĵo de atomvunditaj en Hiroŝimo* de Hukuta Masao, eldonita en 1968 de Asake-Syoboo. Temas pri 29 atestoj de viktimoj de la atombombo.

(Henri Masson, Francio)

La Arkeo de Noa retrovita (1)

(*De Ark van Noah teruggevonden*)(1)

En 1939 antaŭa rusa armeopiloto, Vladimir Rokovitskij, ortodoksa misiisto en Usono, rakontis en la kalifornia gazeto "New Eden" mirigajn faktojn, kiuj okazis en la somero de 1916. La okazaĵo tuj havis grandan resonon en la tuta mondo, escepte en Rusio, kie la historio de Roskovitskij estis publikigita nur en 1994. Jen resumo de la artikolo aperinta en la rusa revuo

Nauk i Religia (Scienco kaj Religio).


“Ni estis grupo da aviadilistoj, staciitaj sur provizora aerodromo je 25 mejloj nord-okcidenten de la monto Ararato. Dum tiuj tagoj la vetero estis varmega kaj seka. Eĉ la lacertoj, kaŝitaj en la ombro de la rokoj, anhelis por spiri. Iam kaj iam blovis leĝera vento, kiu kaŭzis nubojn de polvo kaj ondigis la maloftan vegetaĵaron. Super la montopintoj oni povis vidi nubojn, kaj iom pli alte la senmakulan supron de Ararato, kovrita per eterna neĝo. En tiu neeltenebla varmego ni revis refreŝigi nin en tiu neĝo.

“Tiam nia komandanto eniris nian barakon kaj diris, ke aviadilo numero 7 estis preta por fari testojn en granda alteco. Mia kompano kaj mi estis invititaj fari tiujn testojn. Tiel ni povis almenaŭ eskapi al tiu varmego! Ni ne perdis tempon lasante la motoron varmiĝi, ĉar pro la sunvarmo la aviadilo jam estis brulante varmega. Ni superflugis la sektoron, ĝis ni atingis 14.000 futojn da alteco, kaj dum mallonga tempo ni restis tie por kutimiĝi al tiu nivelo.

“Mi rigardis dekstren en la direkto de la belega neĝokovrita supro, kiu en tiu momento troviĝis je ioma distanco sub ni. Kaj pro kialo kiun mi ne povas ekspliki, mi decidis stiri la aviadilon rekte al la supro. La kunpiloto rigardis min, surprizita de mia manovro, sed la bruo malhelpis lin demandi, kion mi intencas fari.



Paĝo el la revuo *Scienco kaj Religio* (1994) kun la Arkeo. Inter la du fotoj : ‘ Serĉantoj de la Arkeo’.



Ĝenerale je la rapideco de 100 ĝis 120 mejloj hore nia pozicio devis malmulte ŝanĝiĝi.

“Rigardante malsupren, mi vidis gigantajn rokojn piede de la monto, kaj mi memoris, ke mi jam aŭdis paroli pri ili. Vidante tion, mi repensis pri tiu malnova legendo, laŭ kiu multajn jarcentojn antaŭ Kristo pilgrimantoj grimpis sur la monton por atingi la Arkeon de Noa kaj forgratis la linimenton por fari el ĝi amuletojn. La legendo rakontas ankaŭ, ke la plimulto de tiuj pilgrimantoj neniam revenis, ĉar ili mortis sur la monto, frapitaj de fulmo.

“Ni superflugis dufoje la supron je la sama nivelo, kaj tiam ni decidis stiri la aviadilon en la direkto de la suda flanko de la monto. En tiu momento ni vidis lagon, kiu havis la koloron de smeraldo, sed kiu estis kovrita per neĝo en la ombrita flanko.

“Ni faris cirklon kaj repasis super la lago por bone rigardi ĝin. Subite mia kamarado ekkriis, tre ekscitite montrante la lokon, kie la lago transbordiĝis. Mi rigardis kaj estis surprizita per tio kion mi vidis.

“Kio estas tio?” mi kriis. “Ĉu submarŝipo?”

Ni vidis nigran lignan strukturon, faritan el longaj, larĝaj, rondaj traboj. La supra parto estis rondigita, kaj laŭlonge de la supra parto estis strukturo je tri futoj alta.

“Kia stranga konstruaĵo! Ĝi ŝajnis esti konceptita por rezisti al enormaj ondegoj! Ĝi simi-lis al giganta rondlignaĵo konstruita por teni sin fluanta dum marŝtormo. Ĝi estis tiel longa kiel ŝipego kaj povis esti komparata al moderna militista ŝipo. Kvarono de la konstruaĵo estis subakvigita en la lagon. La antaŭa kaj la malantaŭa partoj de la ŝipo estis parte malkonstruitaj. Ĝi havis grandegan aperturon – de ĉir-

kaŭ 20 kvadrataj futoj –, sed la pordego malaperis. La aperturo ŝajnis tro granda, misproportia. Niaj modernaj boatoj tre malofte havas tiajn grandajn pordegojn, eĉ ne la duonon de tiu grandeco.

“Reflugante al la aerodromo post tiu nekuti-ma esploro ni rompis ĉiujn rapidorekordojn por rekuperi la perditan tempon.”

Rokovitskij rakontis ankaŭ en la sama gaze-to, ke liaj kamaradoj-soldatoj primokis lin, aŭdante lian ekscitan entuziasman raporton.

Nur la komandanto de lia grupo ne ridis, sed kontraŭe proponis refluigi mem super la monto por povi pli bone inspekti la misteran objekton. Kiam li revenis sur la aerodomon li diris:

“Tiu stranga objekto efektive estas la Arkeo de Noa. Ĝi jam estas tie ĉirkaŭ 5000 jaroj kaj dum 9 ĝis 10 monatoj de la jaro ĝi estas pakita en glacio. Ĝi estis konservita en natura fridujo dum tiu tuta tempo ! Vi faris la plej grandan malkovron de nia tempo !”

“Post tio la komandanto sendis raporton pri la malkovro al Peterburgo. Leginte ĝin, la imperiestro Nikolao la II-a sendis du taĉmen-tojn da soldatoj al la monto Ararato, ordonante ilin supreniri laŭ la monto je la flanko, kie la arkeo estis malkovrita. Cento da viroj, grimpante sur krutajn rokojn, atingis iun supron, dum alia grupo de 50 viroj atingis alian supron. Ses semajnojn poste la plej granda grupo atingis la Arkeon, kaj la alia grupo povis observi ĝin je iu distanco.”

“Ili faris detalajn mezuradojn, desegnaĵojn kaj multajn fotojn. Ene de la Arkeo ili vidis centojn da malgrandaj ĉambroj kaj kelkajn pli larĝajn kun altaj plafonoj. Ĉio estis ŝmirita per substanco simila al vakso, speco de sigelvakso, rivelante altkvalitan fabrikaĵon de civilizacio, kiu bone konis la aferon.

“Por konstrui la Arkeon oni uzis lignon de la rozkolora laŭro, kiu apartenas al la familio de la cipresoj kaj kiu ne putras, kio eksplikas sian bonegan staton krom la fakto, ke ĝi estis liniementita kaj enpakita en glacio.

“Iom pli for la viroj malkovris ŝirmejon fari-tan el fostoj, kiuj devenis de la Arkeo. En ĝi ili trovis krudajn ŝtonojn, stakitaj en formo de al-taro, kiel faris la judoj en la antikvaj tempoj por oferi aferojn. Eble tiu altaro kaj tiu ŝirmejo estis detruitaj de fulmo kaj fajro, ĉar la pali-setoj estis bruldifektitaj.

“Kelkajn tagojn post kiam li ricevis la rapor-ton de la ekspedicio, la caro kaj lia registaro estis forpelitaj de la Bolŝevikoj, kiuj ekkon-trolis la landon.”

(*Revuo Science et Foi, Parizo*)

La usona Interna Milito (4) **(De Amerikanske Burgeroorlog) (4)**


La Sudo sendis fortan armeon kun generalo Bragg al Kentukio por rekonkeri la ŝtaton. Li esperis, ke la kentukianoj ribeliĝos kontraŭ la norduloj ĉe lia alveno. Ĉio ŝajnis tie perdita por la Unio, kiu sendis netrejnitaĵajn regimentojn por malrapidigi la marŝon de Bragg, antaŭ ol Buell povis atingi lin. Buell forgesis Chatta-nooga kaj rapide remarŝis al Kentukio. Kiam lia armeo alvenis tie, li ne ĉeestis kaj eĉ ne sciis, ke la batalo komenciĝis. Vespere li mal-kovris, ke li perdis 40.000 virojn. Sed la kentukianoj ne rebeliĝis por subteni Bragg, kaj li retiriĝis suden al Teneseo.

Tiam la Konfederacio sendis generalon Van Dorn al Corinth por rekapti la urbon. Vaŝing-tono sendis generalon Rosecrans kun freŝaj trupoj por helpi Buell. Rosecrans atakis Van Dorn la 4-an de oktobro kaj devigis lin retiriĝi. Sed Grant ne estis kontenta pri Rosecrans, ĉar li ne neniigis la armeon de Van Dorn.

Ĉe la tagiĝo de la 29-a de decembro Bragg tiel forte atakis Rosecrans, ke tiu ĉi devis reti-riĝi. La 2-an de januaro 1863 Bragg denove atakis Rosecrans, kies artilerio tiel forte pri-pafis la sudajn brigadojn, ke la atako de Bragg fiaskis, antaŭ ol ĝi vere komenciĝis. Sed tiun nokton Rosecrans retiriĝis, lasante 13.000 mor-tigitajn sur labatalkampo.

La 1-an de januaro 1863 prezidento Lincoln abolis sklavecon en ĉiuj ŝtatoj de Usono. Tial Francio kaj Anglio ne plu povis subteni la Konfederacion. Aliflanke la Unio komencis enlistigi nigrulojn en siajn armeojn. Ankaŭ Grant ordonis formi nigrulajn regimentojn.

Finfine MacClellan estis eksigita, kaj generalo Burnside ricevis la Potomakan Armeon. Burnside denove invadis Virĝinon kaj marŝis al la urbeto Fredericksburg, kie Lee poziciis siajn trupojn sur serion da montetoj. Burnside sendis divizion post divizio trans la ebenaĵon por ataki la sudulojn. Sed ĉiufoje ili estis falĉitaj per fajroŝtormo, kaj neniu nor-dulo atingis la montetojn. La norda armeo perdis 12.000 virojn en tiu tago. Burnside reorganizis la Potomakan Armeon, sed entreprenis nenion plu. Tial li estis anstataŭigita per generalo Hooker, kiu komandis entute 120.000 soldatojn. Kun 80.000 soldatoj li marŝis al Chancellorsville en Virĝinio, kie la armeo de Lee troviĝis en tranĉeoj, dum la norda generalo John Sedgwick venis kun 40.000 viroj.



Se Lee restus, kie li estis, li trafus inter la du armeoj kaj estus neniigita. Lee lasis 10.000 virojn por teni sian linion kontraŭ Sedgwick, kaj kun la resto de la trupoj li marŝis kun Stonewall Jackson al Chancellorsville. Kun 20.000 viroj Stonewall Jackson atakis Hooker en la flanko, dum Lee atakis lin kun malpli ol 20.000 soldatoj. Hooker retiriĝis, lasante 17.000 virojn sur la batalkampo. Ankaŭ Sedgwick, kiu venis tro malfrue por helpi Hooker, estis venkita. Sekve Hooker demisiis kiel ĉefgeneralato de la Potomaka Armeo kaj estis anstataŭigita per generalo George Meade.

Frue en novembro Grant marŝis al Vicksburg, fortega sudula fortikaĵo apud Yazoo, alflua rivero de Misisipo en la sudo de Misisipio. Tri provoj atingi Vicksburg de la nordo kun boatoj tra riveroj malsukcesis. Fine de januaro 1863 li alboridiĝis je 10 km sude de Vicksburg sur la okcidenta bordo de la rivero Misisipo, kiu estis nenormala alta – ĉar estis vintro.

Finfine meze de aprilo, post kiam la akvo estis sinkinta, la ekspedicio startis. Li ŝteliris inter la du ĉeestaj sudaj armeoj – tiu de Pemberton kaj tiu de Johnston –, marŝis al la ĉefurbo Jackson, kiun li konkeris, kaj tiam reiris okcidenten al Vicksburg.

Johnston atakis Grant la 16-an de majo 1863 between Jackson en Vicksburg. Dum la batalo alvenis kuriero de Halleck kun la ordono, ke Grant devas resti en Grand Gulf apud Misisipo.

Ridante Grant disŝiris la leteron antaŭ la okuloj de la kuriero. Johnston devis retiriĝi. Ĉar la vagonoj kun siaj provizoj ne alvenis – ili estis kaptitaj de la suduloj –, Grant ordonis kapti ĉiujn bestojn en la kamparo. Tiam li ĉirkaŭis Vicksburg per duoncirklo, enfermante Pemberton kun ties 31.000 soldatoj, dum Johnston vane provis rompi tiun duoncirklon.

La kanonboatoj pripafis la fortikaĵon ekde la rivero. La 30-an de julio 1863 Pemberton kaptulacis senkondiĉe. La 31.000 soldatoj demetis siajn armilojn, kaj post ilia promeso ne plu batali kontraŭ la Nordo, Grant permesis ilin iri hejmen. Tiel li kaptis 72 kanonojn kaj pli ol 60.000 malgrandajn armilojn. Tio estis la unua granda venko de la Nordo.

Lee konvinkiĝis, ke la plej bona maniero defendi Virĝinon, estas batali kontraŭ la norduloj en la Nordo mem. Meze de majo li invadis Marilandon tra la valo Shenandoah, inter la montoj en okcidenta Virĝinio, sekvata de la Potomaka Armeo sub generalo Meade. Fine de junio li atingis la urbeton Gettysburg en Pensilvanio, kiu ŝajnis al Lee la plej bona loko por renkonti la nordan armeon.

La kavalerio de John Buford estis la unua nordo armetrupo kiu alvenis. Buford tuj okupis la montetojn en formo de duonluno kaj atendis la atakon. Sed Lee ne atakis, ĉar li ne konis la nombron de la norduloj sur la montetoj. Li atendis Jeb Stuart kun la kavalerio, kiu devis informi lin pri tio, sed kiu ne venis.



Generalo Ulysses S. Grant

Post tio alvenis la norda generalo John Reynolds kun la Unua Armeokorpuso. Tiam Lee ordonis sturmi la dekstrajn montetojn, sed ne povis konkeri ilin. Kolonelo Chamberlain sukcese defendis ilin kun la resto de 20-a regimento de Majno, nur 350 viroj, kontraŭ du sudaj regimentoj. Ili preskaŭ ĉiuj mortis.

La 2-an de julio 1863 George Meade fine alvenis kun la resto de la norda armeo. Meade tuj plifortigis la mezon de la duonluno, kie li atendis la atakon. Tiun atakon Lee preparis per forta kanonado de la mezo de la montetoj. Tiam li sendis tien 15.000 soldatojn kontraŭ la nordajn kanonojn. Ili devis transiri ĉirkaŭ 2 km de malfermita tereno, kaj preskaŭ ĉiuj mortis.

Lee perdis unu trionon de sia armeo, Meade unu kvaronon. Entute 53.000 viroj mortis. Sed la Sudo ne estis venkita : la milito estis daŭranta ankoraŭ du jarojn.

Post duonjaro da ripozo en Teneseo ankaŭ Rosecrans finfine aktiviĝis. En junio li ekmarŝis al Chattanooga en orienta Teneseo kun ĉirkaŭ 60.000 viroj kaj atakis Bragg. Tiu retiris sian armeon de 45.000 viroj al Lafayette en la nordo de Georgio, kie li ricevis plifortigon de Joe Johnston. Rosecrans kaj Hooker, sendita tien kun armeo, kune renkontis Bragg kaj Johnston apud Chickamauga trans la montojn en okcidenta Georgio kaj venkis ilin.

En marto 1864 la usona Kongreso denove kreis la postenon de leŭtenanto-generalo kaj Lincoln donis ĝin al Ulysses Grant. La plano de Grant estis tre simpla : la suduloj havis du

ĉefajn armeojn : la armeo de Virĝinio kun Robert Lee kaj tiu de Teneseo kun Joe Johnston. La armeo de Lee troviĝis sude de la rivero Rapidan en Virĝinio, dum Johnston kampadis en Georgio antaŭ la ĉefurbo Atlanta.

Grant dividis la nordan armeon en du partojn : Sherman estis marŝonta al Johnston en Georgio kun 90.000 viroj, kaj la Potomaka Armeo kun Grant estis marŝonta al Lee.

(Laŭ libro de Bruce Catton)

Nia rakonto : La Muŝo (3)

(Ons verhaal : De Vlieg) (3)

En tiu momento la mastro rimarkis, ke muŝo falis en lian grandan inkujon kaj estis provanta elgrimpi el ĝi. "Help' ! Help' !" ŝajnis diri tiuj baraktantaj kruretoj. Sed la flankoj de la inkujo estis malsekaj kaj glataj. Ĝi refalis en la inkon kaj rekomencis naĝi. La mastro prenis plumon, eligis la muŝon el la inko kaj metis ĝin sur folio de sorba papero. Dum frakcio da sekundo ĝi kuŝis senmove sur la malhela makulo, kiu disvastiĝis sub ĝi. Tiam la antaŭaj kruretoj ekmoviĝis, kaj la muŝo restariĝis kaj komencis la imensan taskon purigi siajn flugiletojn. Super kaj sub la flugiloj moviĝis la antaŭkruretoj. Tiam ekestis paŭzo, dum kiu la muŝo ŝajnis

Karlo kaj Elegasto

La kavalirromano 'Karlo kaj Elegasto', perlo de la mezepoka nederlanda literaturo, nun ekzistas ankaŭ en Esperanto. Ĝin tradukis en nerimantajn versojn Pieter Jan Doumen.

La romano rakontas aventuron de imperiestro Karlo la Granda (742-814), kiu ricevis de Dio la ordonon nokte iri ŝteli. Post longa hezitado li obeas kaj renkontas la rabkavaliro Elegasto, kiun li maljuste punis, senigante lin de lia rango kaj posedoj. Kune ili rompŝtelas ĉe Egeriko, la bofrato de Karlo. Tiel Karlo ekscias ke Egeriko intencas murdi lin la postan tagon. Ĉirkaŭ 1400 versoj en flua lingvo (65 paĝoj en la formato 14.50 cm x 19.50 cm).

Prezo: € 9,00.

Havebla ĉe la eldonejo VoKo,
S-ro Gerrit Berveling

Kalverstraat 8-B,

NL-8011 LH Zwolle, Nederlando.

Retadreso: gerrit.en.madzy@planet.nl

provi ekstari per la pintoj de siaj piedfingroj, provis etendi unu flugilon, tiam la alian. Kiam tio sukcesis, ĝi sidiĝis kaj komencis kiel miniatura kato purigi sian etan vizaĝon. Tiam la antaŭaj kruretoj delikate kaj gaje frotis unu kontraŭ la alia. La terura danĝero pasis. Ĝi estis denove preta repreni sian vivon.

Sed ĝuste en tiu momento la mastro ekhavis ideon. Li plonĝis sian fontoplumon denove en la inkujon, plenigis ĝin, metis sian dikan pugnon sur la sorban paperon kaj, dum la muŝo provis siajn flugilojn, dika, peza gutto da inko falis sur ĝin. Kion ĝi estis faronta kontraŭ tio ?

La malgranda insekto ŝajnis momenton tute svenigita kaj ne plu moviĝis. Ĝi verŝajne timis moviĝi pro tio kio estis okazonta nun. Sed tiam, kvazaŭ kun doloro ĝi trenis sin antaŭen. La antaŭaj kruroj moviĝis, sukcesis restariĝi kaj, sed ĉi-foje pli malrapide, ĝi rekomencis la saman taskon de la purigado.

Ĝi estas kuraĝa malgranda diablo, ekpensis la mastro, sentante veran admiron por la muŝo. Tio estas la bona maniero aliri problemojn ; tio estis la ĝusta spirito. Neniam kapitulaci, neniam deziri la morton. Tio estas nur demando de kuraĝo.

Sed dum la muŝo denove finis sian malfacilan taskon, la mastro havis ĝuste la tempon replenigi sian plumon and faligi alian guton sur la freŝe purigitan korpeton. Kio estis okazonta ĉi-foje ? Sekvis doloriga momento da suspenso. Sed la antaŭaj kruretoj denove moviĝis, kaj la mastro ekhavis senton de malpezigo. Li klinis sin super la muŝo kaj tenere diris: "Vi ruza etulo". Kaj li ekhavis la brilan ideo blovi sur ĝin por helpi ĝin sekiĝi."

Ĝiaj klopodoj nun estis timidaj kaj malfortaj, kaj la mastro decidis, ke tiu ĉi fojo estos la lasta, kiam li denove trempis sian plumon profunde en la inkujon. La lasta gutto falis sur la malsekan sorban paperon kaj la malpurigita muŝo kuŝis en ĝi kaj ne plu moviĝis. La malantaŭaj kruroj gluiĝis kontraŭ la korpeto, kaj la antaŭaj kruretoj ne plu estis videblaj.

"Ek", diris la mastro. "Bone rigardu !" Kaj li tuŝis ĝin per sia plumo, sed estis vane. Nenio okazis : la muŝo estis mortinta.

La mastro levis la korpeton per la finaĵo de sia papertranĉilo kaj ĵetis ĝin en la paperkorbon. Sed doloriga sento de kulpo kaptis lin, tiel ke li efektive sentis timon. Li apogis sin antaŭen kaj premis sur la tintilon por Macey.

"Alportu al mi alian folion de sorba papero," li diris severe.

Kaj dum la maljuna servisto foriris, li miris, pri kio li pensis antaŭe. Kio do estis ? Estis ... Li tiris naztukon el sia poŝo kaj pasigis ĝin malantaŭ sia kolumo. Li ne plu memoris tion, eĉ se li povus savi per tio sian vivon.

(Katherine Mansfield)

Programo de la Limburga Esperanto-Asocio 2012-2013

La aktivajoj por la membroj de LEA okazos je la 20h00 de ĉiu lasta jaŭdo de la monato (escepte en decembro) en lokalo de la Peera Kultura Centro, het Poorthuis, Zuidervest 2/A, Peer (fronte al ĉefa enirejo de la preĝejo).

Ĉiuj esperantistoj estas bonvenaj !

Jaŭdon, la 27-an de septembro 2012 :

Skrabloludado gvidota de An Olijslagers

Jaŭdon, la 25-an de oktobro 2012 :

Prelego de Ralph Schmeits (temo ankoraŭ fiksenda)

Jaŭdon, la 29-an de novembro 2012 :

Prelego de Pieter Jan Doumen pri la juneco de D-ro L.L. Zamenhof

Jaŭdon, la 20-an de decembro 2012 :

Zamenhoffesto aranĝota de Henri Leijskens

Jaŭdon, la 31-an de januaro 2103 :

Kartludado gvidota de Henri Leijskens

Jaŭdon la 28-an de februaro 2013 :

Vortludo gvidota de Henri Schutters

Jaŭdon, la 28-an de marto 2013 :

Kantadovespero, gvidota de Pieter Jan Doumen kaj akompanota sur gitaro de Paul Hotterbeekx :

Jaŭdon, la 25-an de aprilo 2013 :

Prelego de Ives Nevelsteen pri la Esperanta komputila lingvo

Jaŭdon, la 30-an de majo 2013 :

Promenado tra Achel, gvidota de Paul Hotterbeekx

Jaŭdon, la 27-an de junio 2013 :

Kradorostado (barbecue) organizota kaj okazonta hejme ĉe An Olijslagers

Pro manko de kandidatoj ne estos kurso por komencantoj.

Enhavo de tiu ĉi numero de ‘La Ponto’:

- Paĝo 2: Kolofono
Redaktore...
Dua Libro de l’ Lingvo Internacia (8) (*D-ro L.L. Zamenhof*)
- Paĝo 3: Eldono de la Unua Libro (*Marjorie Boulton*)
- Paĝo 4: Novaĵoj el Esperantolando:
- Belgio: EU rifuzas himnon en Esperanto (*Ret-Info, Eventoj, Hungario*)
- Paĝo 5: - Argentino : UK en Bonaero en 2014 (*Ret-Info, Eventoj, Hungario*)
- Brazilo : Interesaj filmetoj pri E-aranĝoj (*Ret-Info, Eventoj, Hungario*)
- Nederlando : Diplomoj pro fidela membreco (*Ret-Info, Eventoj, Hungario*)
- Japanio: Nova libro pri Hiroŝimo (*Henri Masson, Francio*)
La Arkeo de Noa retrovita (*Revue Science et Foi, Parizo*)
- Paĝo 7: La Usona Interna Milito (4) (*Laŭ libro de Bruce Catton, Usono*)
- Paĝo 9: Nia rakonto: La Muŝo (3) (*Katherine Mansfield, Anglio*)
- Paĝo 10: Progamo de la Limburga Esperanto-Asocio 2012-2013.

Lernu Esperanton!

Kiom da fojoj ni ne staras en fremda lando kun frostinta lan-go, ne kapablaj paroli la lin-gvon de la tieaj homoj?

La mondo bezonas superna-cian, duan lingvon.

Sola Esperanto ofertas vere demokratian solvon por tiu pro-blemo, ĉar per ĝia ekonomia kaj politika neŭtraleco ĝi metas ĉiujn homojn sur egalan nive-lon. Ĝi estas ne nur la plej facila lingvo en la mondo kaj la sola, kiu estas tute regula – ĝia gra-matiko ne havas esceptojn –, sed ĝi pledas ankaŭ por egalaj rajtoj por ĉiuj popoloj.

“Kiom da lingvoj oni parolas, tiom da fojoj oni estas homo”, diris imperiestro Karlo V. Tamen homo bezonas, ekster sia dialekto, nur du lingvojn: sian nacian lingvon kaj Espe-ranton.

Esperanto ne volas anstataŭigi la naciajn lingvojn, kiel pensas multaj homoj, sed jes servi kiel komunikilo inter homoj, kiuj ne havas la saman gepatran lingvon.

Leer Esperanto!

Hoe vaak staan wij niet in een vreemd land met de mond vol tanden, niet in staat de taal te spreken van de mensen aldaar?

De wereld heeft een supranationale, tweede taal nodig.

Alleen Esperanto biedt een echt democratische oplossing voor dat probleem, want door zijn economische en politieke neutraliteit plaatst het alle mensen op gelijke voet. Het is niet alleen de eenvoudigste taal ter wereld en de enige die volledig regelmatig is – haar grammati-ca heeft geen uitzonderingen –, maar zij pleit ook voor gelijke rechten voor alle volkeren.

“Zoveel talen als men spreekt, zo vaak is men mens,” zei keizer Karel V.

Nochtans heeft een mens behalve zijn dialect maar twee talen nodig: zijn nationale taal en Esperanto. Esperanto wil niet de nationale talen vervangen, zoals sommi-gen denken, maar wel dienen als communicatiemiddel tussen mensen die niet dezelfde moedertaal hebben.

Apprends l’Espéranto!

Combien de fois ne restons-nous pas bouche bée dans un pays étranger, incapables de parler la langue des indigènes ? Le monde a besoin d’une langue supranationale. Seul l’Espéranto offre une solution vraiment démocratique à ce problème, car, par sa neutralité économique et politique, il met tous les hommes sur un pied d’égalité. Ce n’est pas que la langue la plus simple au monde et la seule qui soit tout à fait régulière – sa grammaire n’a pas d’exceptions –, mais il plaide aussi pour des droits égaux pour tous les peuples.

"Autant de langues on parle, autant de fois on est homme," a dit l’empereur Charles-Quint. Pourtant un homme n’a besoin, hors de son dialecte, que de deux langues: sa langue nationale et l’Espéranto, qui ne veut pas remplacer les langues nationales, comme pensent certains, mais servir de moyen de communication entre les gens qui n’ont pas la même langue maternelle.